TRA

LA

ESPERANTA LITERATURO

Malliberulo de Monako [1]

En unu el la lastoj jaroj grava kaj tute nova fakto okazis en la regno. Viro, Monakano, ne unu el la eksterlanduloj, kiuj vagas amase sur ĉi tieaj bordoj, edzo, en momento de l'kolero, mortigis sian edzinon. Li mortigis ŝin sen kaŭzo, sen grava motivo. Indigno estis unuanima en la tuta regno. La supera juĝantaro kunvenis por juĝi tiun esceptan okazon (la unua mortigo en la lando), kaj la malfeliĉulo estis unuanime kondamnita al morto. L'indigninta regnestro konfirmis la verdikton, restis nur ekzekuti la kondamniton. Tiam aperis malfacilaĵo. La lando posedis nek ekzekutiston, nek gilotinon. Kion fari! Laŭ konsilo de la ministro de l'eksteraj aferoj, la princo sin turnis al la franca registaro kun peto ke oni pruntu al li kapotranĉiston kun lia ilo. Longe daŭris konsiliĝoj de l'ministroj en Parizo. Fine oni respondis kaj sendis kalkulon por la transporto de l'aparato kun la specialisto. La tuto atingis la sumon de dek ses mil frankoj. La mortiginto ne valoris tian prezon. Dek ses mil frankoj por la ekzekuto de fripono! Ne, certe ne. Oni sendis la saman proponon al la itala registaro. La itala registaro sendis kalkulon de dek du mil frankoj. Dek du mil frankoj. Dek du mil frankoj! Oni devus kolekti imposton de du frankoj de ĉiu regnano. Tio sufiĉus por kaŭzi malordojn, ĝis nun ne konatajn en la ŝtato. Oni volis senkapigi la krimulon per simpla soldato. Sed la generalo, kies konsilon oni demandis, respondis ŝanceliĝe, ke kredeble liaj soldatoj ne estas kapablaj plenumi taskon, kiu postulas grandan sperton en la uzado de l'glavo. La princo ree kunvokis la superan tribunalon kaj prezentis al ĝi la embarasatan okazon. Oni longe diskutis, sed trovis neniun praktikan rimedon. Fine la prezidanto proponis sanĝi la mortpunon per ĝismorta malliberigo, kaj oni akceptis la proponon. Sed la lando ne posedas malliberejon. Oni devis ĝin aranĝi; oni elektis gardiston, al kiu oni transdonis la malliberulon. Dum ses monatoj ĉio prosperis. La malliberulo dormis la tutan tagon sur pajlo en sia ĉambreto kaj la gardistö faris la samon sur seĝo antaŭ la pordo, aŭ rigardis la pasantojn. Sed la princo estas ŝparema kaj postulas, ke oni raportu al li pri ĉiuj elspezoj farataj en lia ŝtato (la listo ne estas longa). Oni prezentis al li la kalkulon de la elspezoj por la malliberejo, malliberula kaj gardisto. La salajro de la lasta peze ŝarĝis la budĝeton de la monarĥo. En la komenco li faris grimacon, sed konsiderinte ke tio povas daŭri eterne (la kondamnito estis juna), li ordonis al la ministro de l'justeco trovi rimedojn por forigi ĉi tiun elspezon. La ministro interkonsiliĝis kun la prezidanto de l'tribunalo kaj ili decidis nuligi la oficon de l'gardisto. La malliberulo, kiu devos mem sin gardi, sendube forkuros, kaj la problemo estos solvita kontentige por ĉiuj. La gardisto revenis al sia familio, kaj oni komisiis al servisto de la palaca kuirejo porti ĉiutage, matene kaj vespere, la nutraĵon al la krimulo. Sed la kondamnito tute ne provis reakiri la liberecon.

Unu tagon, kiam oni forgesis alporti al li la nutraĵon, li mem tute senĝene venis por ĝin postuli en la kuirejon, kaj de tiu tempo, por ne lacigi la piedojn, de l'kuiristo, li mem ĉiutage venis en la palacon, manĝis tie kun la servistoj, eĉ fariĝis ilia amiko. Post la matenmanĝo li promenis ĝis Monte-Carlo. Iafoje li iradis en la kasinon por riski kvin frankojn sur la verda drapo. Kiam li gajnis, li regalis sin per luksa tagmanĝo en bona hotelo, poste li revenadis en sian malliberejon kaj zorge fermis le pordon interne. La situacio fariĝis malfacila ne por la kondamnito, sed por la juĝistoj. La tribunalo ree kunvenis kaj oni decidis proponi al la krimulo forlasi la ŝtaton de Monako. Kiam oni konigis al li la decidon, li respondis simple: « Vi igas min ridi. Kion mi faros? Mi havas neniajn rimedojn por ekzistado. Mi ne havas familion. Kion mi devas fari? Mi estis kondamnita al la morto. Vi ne ekzekutis min. Mi diris nenion. Poste mi estis kondamnita al ĝismorta malliberigo kaj transdonita al gardisto. Mi ankaŭ tiam diris nenion. Hodiaŭ vi volas forpeli min el la lando. Ne, certe, ne! Mi estos malliberulo, via malliberulo, juĝita kaj kondamnita de vi. Mi fidele obeas la punon. Mi restas ĉi tie ». La supera tribunalo estis konsternita. La princo terure ekkoleris kaj ordonis trovi rimedon por aranĝi la aferon. Post longa diskutado oni decidis proponi al la krimulo pension de sescent frankoj por ke li povu vivi en eksterlando. Li konsentis. Li luis malgrandan domon kun tero en kvinminuta interspaco de la lando de sia antaŭa monarĥo, kaj li vivas feliĉe sur sia tero. Oni povas trovi en la juĝaj arĥivoj de la princlando la verdikton pri la pensio de l'krimulo, devigantan lin forlasi la monakan teritorion.

El *Guy de Maupassant*, trad. Kabe.

[1] Ni eltiras tiun novelon el la jus aperinta bonega « Legolibro » de Kabe kiun ni rekomendas al ĉiuj niaj legantoj.

LINGVA FAKO

Lingvaj Klarigoj

Ni tie ĉi plezure respondos ĉiujn demandojn gramatikajn, vortajn aŭ sintaksajn, kiujn sendos al ni niaj legantoj, kondiĉe, kompreneble, ke tiuj demandoj prezentu ĝeneralan intereson kaj celu punktojn ne tute elementajn.

Al S-ro B. D. — La vorto *krestomatio* (internacia vorto) signifas kolekton de la plej bonaj literaturpecoj de la literaturo.

La esprimon francan « ailleurs que » oni plej ofte tradukas per aliloke ol·

Al S-ro B. M. Pri la prepozicioj el, al, kiel prefiksoj. — La prepozicio *el* signifas 1e aŭ eliron (ekz: eliri, eltiri); 2e aŭ la finan plenumon de io. Ekz: elsekigi (= plene sekigi), elfini (= tute fini), elpagi (= plene pagi). La prepozicio *al* signifas movon al, aliĝon, pliecon: aliri, aldiri, aldoni. Laŭ konstato de la nunaj ekzistantaĵoj, oni povas diri, ke la prepoziciaj uzataj kiel prefiksoj havas pli vastan kaj pli elastan sencon ol en la okazoj, kiam ili estas uzataj aparte, t-e, nur kiel prepozicioj.

Al S-ro J. T. Pri ĝi kaj tio. — La pronomo ĝi signifas ion, kiu ne havas sekson aŭ kies sekso estas ne konata. La pronomo *tio* havas ankaŭ tiun saman sencon, kun plie, la ideo de montro. Sekve, oni povas preskaŭ ĉiam uzi *ĝi* kaj *tio* unu anstataŭ la alia, sed kiam oni montras ion, estas pli bone uzi *tio*.

Al S-ro L. B. Pri la sufikso « ism ». — La sufikso *ism* ne estis enmetita en la nomaro de la Esperantaj sufiksoj sendube pro tio ke ĝi estas jam internacia, kaj ke ĉiuj vortoj, kiuj posedas la finiĝon *ism* apartenas plenrajte al nia vortaro pro tiu kaŭzo, ke ili estas plene internaciaj. Tamen, via opinio, ke oni devus enkonduki tiun sufikson en la ĝisnunan Esperantan afiksaron estas tute aprobinda, ĉar tio forprenus multajn memstarajn radikojn el nia vortaro. Aliparte, ŝajnas al ni pli regule diri *katolikismo, mistikismo*, k. t. p., ol *katolicismo, misticismo*, kiujn ni jam vidis en kelkaj vortaroj. Pro tio ankaŭ, la enkonduko de *ism* estas dezirinda. La senco de tiu sufikso estas « sistemo, dogmaro, doktrino de.. ». Ekz: socialismo, katolikismo, Kalvinismo, materialismo, pozitivismo, k. a.

Al S-ro R. S. Pri la sufikso « ebl ». — La senco de tiu sufikso estas: kiu povas estis farata aŭ kiun oni povas fari; tiu senco estas esence pasiva (Ekz: legebla = kiu povas esti legata); sekve meti tiun sufikson post verbo netransitiva estas erare, ekz: vivebla, mortebla. Oni devas diri *vivema, mortema*, iom pligrandigante la sencon de *em*, kaj aldonante al ĝi la sencon « kiu povas fari », ĝis la momento kiam ni havos specialan sufikson por esprimi tiun ideon — kio ŝajnas al ni tre dezirinda.

H.

EKZERCETOJ

Ĉe la Esperanto-Konsulo

Bonan tagon, Sinjoro! mi petas vian pardonon, se mi ĝenas vin. Mi estas kompostisto, dudekjara; mi alvenas el mia urbo Dresdeno kaj dezirus trovi oficon en via urbo. Mi ankoraŭ tre malbone povas paroli per via lingvo; tial mi estus al vi tre danka, se vi bonvolus helpi al mi por trovi la deziritan de mi oficon, kaj konigi al mi kelkajn samideanojn de via urbo. Jen estas letero de rekomendo, kiun donis al mi la Esperanto-delegito (konsulo) de Dresdeno.

— Mi deziras al vi bonvenon en via urbo, sinjoro. Ni povos viziti unue la sekretarion de la Esperanto-Oficejo, S-ro T..; se mi ne eraras, ĉi-tiea presisto jus parolis al li pri bezonata kompostisto. Car en tiu presejo, oni kelkafoje presas esperantajn artikolojn por loka jurnalo, via scio de Esperanto povos estis utila kaj vi kredeble estos dungata. La dirita sinjoro donos plie al vi ĉiujn aliajn informojn pri loĝado, pensiono, k. t. Se vi bonvolas ĉeesti nian venontan esperantistan kunvenon je la venonta lundo, mi vin revidos tie, mi prezentos vin al miaj samideanoj kaj vi bonvolos diri al mi, ĉu ĉio sukcesis al vi en viaj klopodoj aŭ ĉu mi povas ankoraŭ esti utila alvi.

— Mi humile dankas vin pro via afableco, sinjoro, kaj viaj bonegaj konsiloj kiuj estos al mi plej utilaj.

Leteroj

Torino, 15 Majo 1908

Al Esperanto-Oficejo de B...

Estimataj sinjoroj,

Car mi legis en la ilustrita gvidlibro de via lando, disdonita en nia lasta esperantista kunveno, ke estas en via regiono belaj somerrestejoj kun malkaraj hoteloj, mi petas vin, ke vi bonvolu montri al mi stacion, je 1000 ĝis 1500 m. da altitudo, preferinde proksime al arbaroj, kun bela vidaĵo sur la montojn se eble, kaj ne tro malproksime de fervojo. Mi dezirus pasigi tie du monatojn kun mia edzino kaj du infanoj. Mi dezirus pagi de 10 ĝis 15 sm. ĉiutage por la tuta familio.

Dankante vin antaŭe, mi petas vin akcepti la certigon de mia alta estimo.

⁂

Berno, 20 Majo 1908.

Al S-ro Z., en Torino.

Tre estimata sinjoro,

Mi ĉi-kune sendas la prospektojn esperante redaktitajn de la pension-hoteloj B kaj C, vilaĝoj en kiuj vi trovos sendube la deziratan somerrestejon. Se tiuj prospektoj ne donas al vi sufiĉajn informojn, mi turnos min, post via peto, al la ĉi-tiea societo por pliprosperigo por ĉiuj pliaj bezonataj sciigoj.

Altestime via.

Esperanto-Oficejo, Berna.

Le sekretario, L...

Anekdotoj

Edzino: ĉu vi ne mallongigos viajn vivotagojn, se vi tiom trinkas?

Edzo: pro tio, mi ĝuste penas plilongigi la noktojn.

Paciento: sinjoro kuracisto, mi fine ricevis forton sufiĉan per trinki bieron — Kuracisto: estus pli bone, se vi havus forton sufiĉan por ne trinki bieron.

Kuracisto: en tiu stato, mi konsilas al vi trinki ne tro multe. — Paciento: estu kontenta, sinjoro Kuracisto, mi ĉiam havas tro malmulte por trinki.

Knabo: Paĉjo, ĉu estas vere, ke ekzistas drakoj nur en la fabeloj?

Paĉjo (malĝoje rigardante al Panjo): Tion mi ankaŭ kredis pli frue.

Mastrino: Estas tre strange, ke nenio tiel doloras min, kiel kontraŭdiro. — Servistino: estas rimarkinde, ke ĉe mi estas ankaŭ tiel.

La homoj devas esti kiel bonaj cigaroj: ĉiam postelasi bonan odoron.

FELIETONO DE " ESPERANTO " 6

LA SABLA HOMO

el E. T. A. HOFFMANN

(trad. A. R.)

Alvenante ĉe la universitato, Nathanael kun surprizo eksciis ke la domo, en kiu troviĝis lia modesta studentĉambro, jus forbrulis. Liaj kamaradoj povis nur savi liajn paperojn, diversajn librojn kaj kelkajn fizikinstrumentojn. Ĉiuj tiuj ĉi objektoj estis portitaj al alia loĝejo kien li transloĝiĝis. Tiu nova loĝejo sidis ĝuste kontraŭ la fenestroj de profesoro Spallanzani. El la fenestro de sia ĉambro, Nathanael povis enrigardi en la kabineton, kie fraŭlino Olimpia konstante sidadis ĉe la sama loko, kun la sama vestaro, kun fiksa rigardo kaj la du manoj krucumitaj sur la tablo. La studento en la komenco ne multe atentis ŝin kaj ne ofte jetis al ŝi rigardetojn. La penso pri tio, ke si estas eble idiota, superis ĉian alian supozon kaj li ne tre ŝatis ŝian senmovan belecon; en li forte staradis la rememoro pri Klara, lia amata fianĉino.

Matenon, kiam li tute revadante pri sia baldaŭa edziĝo skribadis longan leteron al sia fianĉino, oni frapis ĉe lia pordo. « Envenu », li diris kolerete kontraŭ la vizitanto, kiu lin ĝenas en tiel dolĉa momento. La vizitanto estis Jozefo Coppola. Nathanael sentis febran frostotremon, sed tuj rememorante pri la informoj al li donitaj de profesoro Spallanzani, li penis forigi sian suspekton kaj li per tranĉa voĉo kriegis: « Iru al la diablo. Mi tute ne volas aĉeti viajn barometrojn » — « Ha! kara sinjoro, respondis Coppola per humila voĉo kaj farante tri profundajn salutojn, mi vendas ankaŭ belajn okulvitrojn por rigardi de malproksime la junulinojn! ». Kaj li tuj ĉerpis el la grandegaj poŝoj de sia vesto tutan kolekton de okulvitroj tiaj, kiajn li neniam vidis. Kaj ĉiuj okulvitroj, ĉiuj lornoj komencis brili kaj jeti ĉiuflanken strangajn fajrojn. Al Nathanael ŝajnis kvazaŭ ĉiu el tiuj objektoj estas rigardo vivoplena, kiu nevenkeble altiris liajn proprajn okulojn. Coppola senĉese eligis novajn objektojn el sia poŝo, kaj de tia amasego, elŝprucis ĉiam pli multaj ardantaj radioj, kiuj ŝajnis trapikitaj per sangoruĝaj koloroj. « Ĉesu, ĉesu! », ekkriis la studento. Forigu ĉion tion ĉi, fripono, se ne, mi vin sufokos! », kaj li jam ekprenis la brakon de Coppola. Sed la trankvilega barometrovendisto, tiel kvieta kvazaŭ lin minacus simpla infano, kolektis ĉiujn siajn okulvitrojn: « Vi almenaŭ aĉetos tiun lorneton, kara sinjoro, li diris. Vidu! ĝi estas tute simpla. sed bonega, mi tion certigas alvi; vi pagos ĝin al mi kiam vi volos. Ho, mi tute ne estas postulema, kaj mi senlime konfidas al vi, kara sinjoro », kaj, dume, li prezentis al Nathanael tre zorge faritan lornon, sed tute neluksan. La studento, kiu jam riproĉis sin pri sia tro rapida malbonhumoro, prenis la lornton kaj fordonis tri dukatojn al Coppola.

Tuj post la foriro de la vendisto, Nathanael ekridis pri sia propra malsaĝeco. « Kien de forflugis mia prudento, li diris al si; kion pensus miaj karaj amikoj, se ili vidus, kiel mi estas ne fidela al miaj promesoj! Verdire, tiu lorno estas utila akiraĵo kaj mi trovas, ke ĝi tute taŭgas por mi ». Tiele parolante, li proksimiĝis al la fenestro kaj ekrigardis senpense al la domo de Spallanzani. Olimpia ĉiam sidis ĉe la sama loko, kaj fikse rigardante al ŝi per sia lorno, Nathanael vidis, kvazaŭ el ŝiaj okuloj eliras palaj radioj, kiuj iom post iom ekflamis per magneta brilo! « Je Dio! diris al si la studento, idiotulino certe ne havas tiajn okulojn; sed ĉu povas esti, ke mi ne ankoraŭ rimarkis ilin? Cetere, mi malbone agas pensante pri tio..., Klara atendas min... mi finu mian leteron ». Li do ree skribis ĝis unu el liaj kunlernantoj venis por akompani lin ĝis la kurso de Spallanzani.

La morgaŭan tagon, Olimpia estis nevidebla; la kovriloj de ŝia fenestro estis tute fermitaj. La trian tagon, ili malfermiĝis, sed malantaŭ la vitroj pendis densa kurteno. Nathanael estis tre malkontenta, ke li ne povas okulumi al sia mistera najbarino. Por distri sin, li iris promeni en la ĉirkaŭaĵoj de l'urbo, sed lin ĉiam persekutis la bildo de Olimpia; ĝi naĝis tra la aero, ĝi flugis al la arbetoj, ĝi rebrilis en la kristalo de la klaraj riveretoj. La plendindan Klara atingis konata malfeliĉo: ŝi estis tute forgesita. Nathanael kuradis ĉi tie kaj tie kvazaŭ frenezulo kaj ĉien disjetis siajn amajn bedaŭrojn kaj la konfuzajn verkaĵojn de sia flamanta cerbo. Post kiam li pro laciĝo denove rekonsciis pri la vivo reala, li reiris hejmen, malrapide, kun la kapo klinita kpj la spirito honta pri lia malforteco. Granda bruo, okazanta ĉe la alia flanko de la strato, lin vekis kaj altiris al la fenestro. La apartamento de Spallanzani estis plena de laboristoj, kiuj trairadis laŭ ĉiuj direktoj. Unuj portis meblojn, aliaj najlis tapetaĵojn; ĉie resonis la surdiga bruego de la marteloj. Nathanael rapide informiĝis pri la kaŭzo de tiu tumulto. Najbaro sciigis al li, ke sinjoro profesoro Nathanael morgaŭ invitos ĉiujn urbajn kaj universitatajn eminentulojn al festobalo, okaze de la unua publika elmontrado de fraŭlino Olimpia, pri kiu oni diris ke ŝi elvokos grandan sensacion. Nathanael, en la sama vespero, ricevis invitan leteron por ĉeesti la balon. Je la ĝusta horo, li kun ĝojego iris ĉe Spallanzani, kaj por la okazo sin vestis plej elegante por proksime vidi la idolon de siaj sonĝoj.

En la salonoj de la prefesoro jam kunvenis multaj personoj; fraŭlino Olimpia, luksege ornamita, elmontris siajn blindigajn graciaĵojn. Nur kelkaj kritikemuloj mallaŭte riproĉis ŝin pro ŝia delikata korpo La junuloj, kiuj tion rimarkis, suspektis, ke pro sia delikata korpo tiu junulno suferas pro la tro granda premado de sia korseto. Olimpia marŝadis majeste kiel reĝino; tamen en ŝiaj gestoj estis ia malelasteco, kiun oni aljuĝis al ŝia natura timemeco.

La koncerto komenciĝis. Olimpia eksidis ĉe la fortepiano kaj ekludis novan romancon, kun voĉo kies sonoreco similis la melodiojn, kiujn oni ludas per harmoniko. Nathanael estis ravita. Sidanta ĉe la lasta vico de la ĉeestantoj, li ne povis tre klare distingi la trajtojn de Olimpia sub la blindiga lumo de la kandeloj. Tiam, li kaŝeme eligis el sia poŝo la lornon de Coppola, kaj li atente ekrigardis la ĉarmojn de la mirinda filino de Spalanzani. Al li ŝajnis, ke de tempo al tempo ŝi jetas al li amajn rigardojn kaj ke ŝia tuta estaĵo esprimas ĉian nuancon de ŝia kanto. La komplikitaj voĉtonoj de Olimpia al sia orelo resonadis, kiel la ĝojkrioj de animo ebria de amo, kaj kiam fine sonis brue la longa *trillo* de la fina kadenco, Nathanael sentis, kvazaŭ sur liaj okuloj pasas ia nubo kaj lia koro malfortiĝas. Ia fantazio forvagis en idealan mondon, loĝitan de graciaj fantomoj, kiuj kun la vizaĝo de Olimpia dolĉe ridetis al li.

(*Daŭrigota*).

12 DECEMBRO 1907. Unu Numero: 10 CENTIMOJ (4 Spesdekoj) TRIA JARO. — Nº 21

★ ESPERANTO ★

DUONMONATA INTERNACIA GAZETO

ABONO

Unu Jaro . . . . Sm. 1.20 | Helpabono . . . . Sm. 4.—

Spesmilo (Sm.) = 100 Spesdekoj (Sd.) = 2,50 frankoj = 2 ŝilingoj = 2 markoj = ½ dolaro = 1 rublo = 2,40 kronoj aŭstr = 1,80 kronoj Skand (proksimume).

Oni abonas ĉe la Administracio
8, Rue Bovy-Lysberg, 8, Genève (Svisujo)
aŭ ĉe la lokaj agentoj

DIREKTORO:
HECTOR HODLER
8, Rue Bovy-Lysberg, 8
Genève (Svisujo)

Bulgara Eldono: N. D. Kovaĉef, Sofio

REKLAMO

1 paĝo	Sm. 100.—	¼ kolono	Sm. 7.—
1 kolono	» 25.—	⅛ »	» 4.—
½ »	» 13.—	1/16 »	» 2.50

25 % por 12 anoncoj; 50 % por 24 anoncoj

Ĝeneralaj Agentoj: G. Warnier, 46, Rue Sainte-Anne, Paris-2e
C. A. L. Browne, 53, Wych Street, London W. C.

LA NUNA NECESAĴO

En lasta artikolo ni aludis pri la situacio, kiun kreis la decido de la Delegitaro kaj, ektuŝinte la demandojn starigitajn de tiu decido, ni konkludis per tio, ke, laŭ nia persona opinio, la momento ŝajnas al ni oportuna por provi inter la proponitaj plibonigoj tiujn, kiuj estus enkondukeblaj sen rompo en nia lingvo, kaj kondiĉe ke la Esperantistaro mem estu demandata pri tio. Ni poste aldonis: « ...Fine, ni diras ke pri ĉia aldono en la lingvo devas juĝi la Esperantistaro mem; neniu homo kaj neniu komitato havas la rajton trudi al ĝi perforte sian personan bonplaĉon ». Tiun ĉi lastan frazon kelkaj personoj ne ĝuste komprenis kaj demandis al si kion ni celas per tiuj vortoj. La momento nun estas tro grava por ke ni ne speciale insistu pri esenca punkto, kiu ĝis nun estis tro ofte forgesita kaj, tion farante, ni esprimas ne nur nian propran opinion, sed la konvinkon de multaj Esperantistoj.

⁂

Ni unue rememorigu la hodiaŭan situacion: la Delegitaro por la alpreno de lingvo internacia principe akceptis Esperanton sed kun propono de reformoj, kiuj, se ili estus akceptataj en sia estanta formo, multe ŝanĝus nian lingvon. Kompreneble, inter tiuj reformoj kaj aldonoj, kelkaj estus enkondukeblaj sen danĝero kaj estas, se ne tuj akceptindaj, almenaŭ diskutindaj, sed antaŭ ĉio estas necesa unu kondiĉo, pri kiu oni nun tute silentas, nome: kiu en la Esperantistaro havas la rajton proponi (ne trudi) difinitajn plibonigojn kaj aldonojn en nian lingvon, aŭ per aliaj vortoj, kiu aŭtoritato reprezentas la tutan Esperantistaron kaj rajtas paroli en ĝia nomo? Tiu ĉi demando havas apartan gravecon en la momento kiam la komitato de la Delegitaro prezentas al la Esperantistaro ion, kiun ni devas atente ekzameni kaj respondi. La diritan demandon kelkaj Esperantistoj sendube respondos per tio, ke D-ro Zamenhof havas nepridisputeblan aŭtoritatecon super la tuta Esperantistaro; sed, oni scias, ke de la komenco de nia afero, D-ro Zamenhof fordonis ĉian rajton de aŭtoreco pri Esperanto, kiu jam fariĝis la posedaĵo de la tuta publiko esperantista. La aŭtoritateco de D-ro Zamenhof, laŭ liaj multfojaj paroloj, estos do pure morala. Aliaj asertos, ke la aŭtoritatecon pri la lingvaj demandoj posedas ekskluzive la Lingva komitato, sed ni rememoru, ke la Lingva komitato estis nur provizore elektita de la Bulonja kongreso laŭ neordinara maniero; ĝi povas nur doni konsilojn en limigitaj okazoj, sed tute ne povas decidi mem pri gravaj demandoj en kiuj estas egale interesataj ĉiuj Esperantistoj, ĉar ĝia aŭtoritateco neniam estis oficiale sankciigita de la Esperantistaro (la Bulonja kongreso, laŭ ĉiuj tiam esprimataj opinioj, havis nenian leĝodonan povon). La Centra Oficejo estas aliparte pure administracia organizaĵo kiu ĉefe zorgas pri la kongresoj. Fine, niaj kongresoj, tion oni ofte diris, reprezentas ne la Esperantistaron, sed simple tiujn personojn, kiuj povas veturi al la kongresurbo; ili estas nur festo, grava publika manifestado, kiu, simile al ĉiu esperantista kunveno, povas esprimi nur dezirojn kaj konsilojn. La Esperantistaro estas reprezentata nur de la lokaj grupoj, naciaj societoj, fakaj asocioj, sed, oni scias, tiuj organizaĵoj havas nenian efektivan ligilon inter si kaj vivas tute aparte unu de la alia. Ni do estas en tiu bedaŭrinda situacio: la Esperantistoj ekzistas, sed ili havas absolute nenian rajtan aŭtoritaton kaj nenian laŭleĝan interligilon. Por garantii nian unuecon en ĉiuj demandoj interesantaj nian aferon, ni havas nur moralan, pure idean ligilon, facile rompeblan. Ĝis nun, pro tio ke nia movado estis ankoraŭ malgranda, ni ne plene konstatis la malbonecon kaj danĝeron de tiu sistemo. sed jus venis la unua grava fakto, kiu montras, ke ni ne povas resti en tia situacio. Al la Delegitaro, kiu proponas ion difinitan al la Esperantistaro, povas plenrajte kaj oficiale respondu *neniu*, ĉar ekzistas nur disaj Esperantistoj kaj disaj esperantistaj organizaĵoj, sed nenia kompetenta reprezentanto de la esperantistaro. Se, nuntempe, iaj aŭ registaroj volus enkonduki Esperanton en la lernejojn de sia lando sub difinitaj kondiĉoj (ekzemple, kondiĉoj de reformoj, antaŭviditaj en la Fundamento), unue ili ne scius al kiu ili devos oficiale sin turni, due al ili povos respondi neniu en la nomo de la Esperantistaro. La estanta situacio, pli klare kaj konvinke ol ĉia komentario montras la bezonon de centra organizaĵo por la Esperantistaro, kiu ne estas abstraktaĵo, sed reprezentas difinitan kolekton da homoj kunigitaj por la sama celo. Oni eble diros al ni, ke Esperanto estas nur lingvo kaj sekve bezonas nenian internacian organizaĵon, sed tiu argumento same kontraŭstarus al la ekzisto de ĉia societo loka aŭ nacia. Esperanto, en la nuna tempo, estas ne nur lingvo, sed *movado*, simila al multaj movadoj en la mondo: tio estas tiel vera, ke por plivastigi tiun movadon oni kreis grupojn kaj societojn, kiuj estas nepre necesaj ĝis la tago kiam Esperanto estos tutmonde praktikata; tiam ĝi estos nur lingvo. De nia unua kongreso, ĝis kiu la bezono de centra, eĉ tre libera, organizaĵo estis ne sentebla, la kondiĉoj de nia afero multe ŝanĝiĝis. Nia movado fariĝis pli granda, pli serioza; ĉiam pli ofte gravaj demandoj estas prezentataj al la Esperantistoj kaj estas ne solvataj simple pro tio, ke mankas kompetenta aŭtoritato rajtigita de la Esperantistaro; kaj ju pli ni antaŭeniros, des pli ni sentos ke tia centra organizaĵo estas necesa, se ni ne volas, ke konfuzeco kaj anarkio estu la regantaj principoj de nia afero. Neniu malkonsentas, ke la nuna demando pri la Delegitaro estus pli facile kaj pli laŭleĝe solvebla, se, anstataŭ privataj homoj interdiskutantaj sen komisio, ekzistus tia organizaĵo. Kiel ajn limigita ĝi estos, centra aŭtoritato estas natura konsekvenco de nia ĝisnuna organismo. Ĉu por ĝin krei ni atendas ĝis okazos inter ni gravaj kaj malfacile kuraceblaj malpacoj? ĝis ni estos implikitaj en tia konfuzaĵo, ke ni povos eliri de ĝi nur kun tre granda malfacileco kaj ne sen danĝero? La momento venis por ke la Esperantistaro povu en tiel gravaj demandoj esprimi sian opinion kaj diri kion ĝi volas kaj kion ĝi ne volas. Fari tion ĉi ĝi povas nur se ĝi estas organizita kaj havas difinitajn rajtigitajn reprezentantojn. Ĝis la epoko kiam la registaroj per speciala leĝo donos al ni ĉiujn garantiojn de vivo, ni bezonas nian propran organizaĵon, kiel eble plej larĝan, kiu helpos por la konservado de nia unueco kaj nin garantios kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj, ambicioj aŭ deziroj.

Kelkaj personoj supozos, ke ni eble dezirus restarigi la diversspecajn projektojn de Ligo, kiun la Bulonja kongreso ne volis. Tiu opinio estas tute ne ĝusta. La Esperantistoj tre certe ne deziras havi centran aŭtoritaton, kiu direktos la propagandon kaj sin okupos pri ĉiuj detaloj de nia movado; ili tute ne deziras havi ian aŭtoritaton, kiu iel limigus nian liberecon kaj iniciativemecon per enmiksiĝo en la vivo de niaj societoj, sed simple kompetentan reprezentantaron, kiu rajtos decidi pri la demandoj, kiuj interesas la tutan Esperantistaron kaj havas internacian karakteron. Tiu organizaĵo ankaŭ neniel celas forigi la nun ekzistantajn Centran Oficejon, Lingvan komitaton, k. t. p., sed ilin rajtigi kaj doni al ili en la nomo de la Esperantistaro difinitan mandaton, kiun ili ĝis nun ne havas. La „Fundamento" de Esperanto povos ankaŭ akiri per tia maniero leĝan rajtigon, kiun ĝi ne ankoraŭ posedas, ĉar ĝi estis akceptita de la Bulonja kongreso, kiu ne povis leĝofari, sed nur rekomendi; en tiu rilato, tiu „Fundamento" estus cetere tre facile atakebla.

Pri la formo de tiu centra organizaĵo povos decidi nur la Esperantistaro mem, sed ni opinias, ke por la nuna momento, oni povus starigi Esperantistan Delegitaron, kiu konsistus el la reprezentantoj de la diversaj — propagandaj kaj fakaj — organizaĵoj Esperantistaj, elektitaj de la Esperantistaro mem, laŭ difinita proporcio; tiu Delegitaro kunvenus antaŭ aŭ dum la kongreso; ĉiu delegito rajtus letere voĉdoni, se li mem ne povas ĉeesti; por tio, estas kompreneble necese, ke kelkajn semajnojn antaŭe, difinita tagordo de la traktotaj demandoj estu publike komunikata al la Esperantistaro, kiu povos ilin mature priĵuĝi. La kunvenoj de tiu Delegitaro anstataŭus kun granda profito la „pseŭdo-agadajn" kunvenojn de niaj kongresoj, kie, la pasinto tion pruvis, oni povas fari neniun utilan kaj praktikan laboron. Tiu Delegitaro mem faros sian regularon kaj starigos sian labormetodon. Ni tie ĉi liveras nur ĝeneralan planon, sed ni estas pretaj ĝin pli detale klarigi laŭ okazo.

⁂

La momento estas nun oportuna. Ĉiuj Esperantistoj pripensu tiun proponon kaj komprenu, ke se ni ne antaŭgardas, la afero Esperanta, pro la nepartopreno de la Esperantista popolo en la diskuto kaj decido de la ĉefaj demandoj interesantaj nian movadon, fariĝos la posedaĵo de kelkaj personoj kaj estos atakata de la plej pereiga malsano: la malordeco, kies karakterizaj simptomoj estas la neesto de aŭtoritateco kaj la senleĝeco, supre la aŭtokratiemeco de la kondukantoj, malsupre la inercio kaj la seniniciatemeco de la kondukatoj. Ni tie ĉi esprimis ne sole ideon, sed la opinion de tre multaj Esperantistoj, kiuj estas pretaj labori por la efektivigo de la dirita propono en formo praktika kaj akceptebla de ĉiuj, kaj submetos sin al nenies decido kaj dekreto ĝis la momento kiam ekzistos aŭtoritato laŭleĝe elektita de la Esperantistaro kaj rekonita de ĝi.

H. Hodler.

TRA LA MONDO

Francujo

Parizo, decembro 1907.

La kunvenoj de la jus remalfermita Parlamento ne prezentis ĝis nun ian apartan atentindaĵon. Oni aŭskultis kun videbla laciĝo kelkajn parolojn pri la Marokaj aferoj kaj oni denove batalis pri la salajro de la deputatoj. Tiu lasta demando vere fariĝas ĉiam pli grava kaj, malgraŭ la klopodoj de la interesatoj, ne estas facile forgesebla. Niaj ne francaj legantoj sciu, ke ĝis la pasinta jaro, la jara salajro de la deputatoj estis 3.600 ŝpesmiloj, sed niaj loĝodonantoj, opiniante ke tiu pago nuntempe jam ne sufiĉas, aldonis, per rapidege voĉdonita leĝo, 2.400 sm. al la nomita salajro, kiu tiel fariĝis 6000 sm. Tio ĉi faris tre malbonan impreson ĉe la plej multaj regnanoj, kiuj opinias, ke tia subita plialtiĝo de la salajro estas io kontraŭdemokratia. Verdire, la postuloj de sinjoroj deputatoj ne estas tiel grandaj kiel kredas kutime la popolamaso. Multaj deputatoj devas forlasi sian profesion kaj ekloĝi en Parizo, kie oni ne povas vivi tre lukse per 3600 sm. ĉefe kiam oni estas honorata je deputateco. Tial, la nova salajro estas pravigebla, sed la deputataro mallerte agis rapidigante tiun leĝon kaj ĝin tuj aplikante, ĉar oni konsideris, ke ĝi agis de vidpunkto tre egoista. Plie, la deputatoj dekstrumaj volonte parolas pri reveno al la malnova sistemo, ĉar ili esperas per tio akiri la favorojn de la elektantoj. Kio ajn estas, la Deputataro tute ne deziras forlasi la novan salajron kaj tre malbone akceptas ĉian tiaspecan provon. La prezidanto de la radikala grupo en la Deputataro, tre influa politikulo, S-ro Sarrien, eĉ demetis sian oficon, ĉar li estis kontraŭ la pligrandiĝo de l'salajro, dum la partio opiniis alie.

Nuntempe, la gazetaro sin multe priokupas per la rezultatoj de la lasta denombrado de la loĝantaro de Francujo. Tiuj rezultatoj estas tute ne ĝojigaj kaj ankoraŭ pli ol en la antaŭaj jaroj atestas pri la malgraveco de la pligrandiĝo de nia loĝantaro. Dum 1906, la nombro de la naskiĝoj superas tiun de l'mortoj nur je 26,651, t. e. unu kvarono malpli ol dum la jaro 1905a. Tiu malpligrandiĝo venas ĉefe de tio, ke la nombro de la mortoj kreskas laŭ maltrankviliga proporcio, kaj tio, kiel ankaŭ la malmulteco de la naskiĝoj, estas simptomo de rasa dekadenco, pri kiu oni nun jam ne devas ridi. La supereco de la naskiĝoj rilate al la mortoj konstante malkreskis de 1902; en tiu jaro ĝi estis 83.944; nun ĝi atingas nur 26,651, kaj tio ĉi estas tiom pli bedaŭrinda, ke tiu malkresko iras tre regule, kvazaŭ ĝi estus natura leĝo. Kompare kun aliaj nacioj, la supereco de la naskiĝoj je la mortoj atingas po 10,000 loĝantoj, 149 en Germanujo, 121 en Britujo, 121 en Aŭstrujo, 106 en Italujo kaj nur 18 en Francujo. En 1850, Francujo kaj Germanujo havis ambaŭ 35 milionojn de loĝantoj. Nun Germanujo havas 62 kaj Francujo ĉiam 39. La problemo estas grava, tiom pli grava, ke ĝi estas praktike ne solvebla. Oni proponis diversajn kuraĝigojn por la grandaj familioj, sed tio havas en la realeco nenian efikon. La Franco estas nun tro antaŭvidema, ne sufiĉe maltimema; li timas la vivon por si mem kaj siaj proksimuloj. La burĝaro montris la malbonan ekzemplon; la popolo nun ĝin imitas, kaj tio ĉi iom-post-iom malfortikigas Francujon.

B. T.

Italujo

Udine, decembro 1907.

La proceso de l'eksministro Nasi okupis la Senaton starigitan kiel altan kortumon, de la 5a ĝis 20a de la novembra monato, ĝis la momento kiam la kunvenoj devis esti interrompataj pro la eliĝo de la konfida advokataro de la kulpigito. La plendantoj pretekstis, ke la senatanoj ne aŭskultis lin kun sufiĉa konsentemeco kaj ke ili ne akceptis la proponon enketi pri la farmaniero de ĉiuj aliaj administracioj aŭ almenaŭ de la ministraĵo de l'publika instruado en la lastaj dudek jaroj. Estis ankaŭ malkonsento pri la maniero per kiu la ministro disdonis la helpan monon al la elementaj instruistoj kaj al la aliaj bezonuloj. Tiu ĉi propono havis kelkajn malfacilaĵojn rilate al la proceduro, ĉar la deputataro ĝis nun ne starigis la kulpigon pri tiu ĉi afero kiu komence ŝajnis flanka, sed nun aperas ĉefa, ĉar la mono malŝparita per tiu maniero estas multe pli granda ol tiu malŝparita por la la vojaĝoj kaj aki-

roj por ornami la domon de la ministro. Rilate al tiu ĉi punkto oni certigas, ke Nasi agis tiele : li sendis poŝtmandaton de malgranda sumo (30 aŭ 40 frankoj) al fantazia adreso de provinca instruito. La poŝtoficejo, ne trovante la adresaton, resendis la poŝtmandaton al la sendinto, kiu enkasigis la monon. La kvitanco de la sendita mandato trebone taŭgis por pruvi la elspezon ĉe la ŝtata kortumo de la kalkuloj. Oni ne povas nei ke Nasi estis plena de talento! Ankaŭ aperis, ke li havis kaj ankoraŭ havos tiom ke klientaro ĉirkaŭ si kaj tian gloramon, ke, se la skandalo ne estus malkovrita, li nun estus prezidanto de la ministraro. De la atestoj faritaj antaŭ la kortumo, rezulis ke la kulpo de la eksministro estis tute pruvita. Plie, li devis silenti antaŭ la asertoj de sia ekssekretario Lombardo, dum antaŭe li kun granda malnobleco provis jeti la kulpon sur la ŝultrojn de sia kunhelpinto. La novaj oficialaj advokatoj en la kunsido de l'3a de decembro petos pri prokrasto de la proceso por studi ĝian dikan dokumentaron. Verŝajne ĝi rekomenciĝos nur la venontan jaron. Dume, Sicilio manifestas, ĉar ĝi volas, ke Nasi estu liberigita por ke li povu prezenti sin al la Deputataro (kiu malfermiĝis la 28an), sed la demando estis resendita al la komisiitaroj kiuj, laŭ kutimo, respondas nur post kelkja semajnoj, nome kiam Nasi estos jam juĝita. Konklude estos tre kurioze elscii kiel finiĝos ĉi labirinta dornejo!

Por ne meti tro da viando en la fajron, la alta konsilantaro preferis ne procesi kontraŭ senatano Diego Taiani, eksministro de la justeco, nun okdekjara, kiu ĉe tiu aĝo faris skandalajn dibočojn. Oni povas sin demandi, ĉar la ministroj agas tiele, kiamaniere devas agi la malaltranga popolo, kiu havas nek instruecon, nek edukecon? En la tagordo de la Deputataro jus malfermita la plej interesa temo estas la propono pri starigo de speciala tribunalo per juĝi la magistratojn aŭ la juĝistojn. Tre bone, ke ankaŭ tiuj sinjoroj estu respondeblaj pri siaj kulpoj! En tiuj lastaj tagoj, la supera Kostumo devis senigi la prezidanton de apelacia kortume, kiu montris sin malinda je sia alta ofico.

La ĉefministro Giolitti prezentis al la deputatoj la raporton pri la enketo rilate al la disdono de la helpa mono kolektita por la Kalabra tertremo de 1905. La malordo en la disdono de la mono estas vere pli terura al la tertremo mem. Kiel sur la skreno de kinematografo ni vidas projekciigitaj : komitatestroj, kiuj faras plezurvojaĝojn tra la ĉefurboj de la meza kaj norda Italujo sub la preteksto kolekti monon kaj organizi helpojn; riĉa urbestro la plej fama advokato de Kalabro, kiu subpostulas monon eĉ de eksterlandaj regnestroj por helpi malfeliĉan familion, kiu konklude estis... lia propra; vilaĝestroj, sekretarioj de komunumo kaj eĉ soldatoj kaj oficiroj, kiuj konservas por si la plej bonajn vestarojn senditajn por la mizeruloj, k. t. p. Fine, el tio rezultas ĝenerala malkontenteco kaj kvazaŭ ribelo kontraŭ la registaro! La nova tertremo de Kalabro, kiu frapis malsaman teritorion, alportis novajn malgajnojn kaj dolorojn, sed la propono de helpoj nun estas prave malpli malavara kaj ilia disdono pli singardema.

La striko de la fervojistoj havis tiun ĉi fojon konsekvencojn ne tiom ĝojajn por la strikantoj ĉar 16 el ili estis eksigitaj kaj multaj aliaj degraditaj. La publiko montris sin malamika al la interrompo de la publikaj servoj. Tamen nun la tramvojistoj de Milano strikas kaj la granda urbo havas la ŝajnon, kiun ĝi havis antaŭ 30 jaroj, kiam ne ekzistis tramoj, sed nur malrapidaj omnibusoj.

La apero de dika kaj plena vortaro italaesperanta, verkita de la lerta P-ro Meazzini, devas esti la plej ĝojiga informo el la Esperantistaro Itala, same kiel la anonco, ke baldaŭ eliros regula itala revueto, kies nomo estos, se mi ne eraras, *Steleto*. Mi esperas, ke la direktoro de tiu nova informilo pardonos al mi mian maldiskretecon kaj ricevos miajn korajn bondezirojn.

A. TELLINI.

Unuiĝitaj Ŝtatoj

Novembro 1907.

El la du naciaj festtagoj de Usono, kiuj estas la plej karakterizaj, nome, la kvara de julio kaj dankotago, la dua estas la pli antikva, kaj kvankam mankas la bruo kaj patriota entuziasmo de la « glora kvara », tamen, ĝi tenas fortan lokon en la koroj de nia popolo, kaj estas la ĉefa familia festtago de la tuta jaro. Gia deveno estis tre humila, kaj ĝiaj fondantoj neniel pensis ke ilia simpla esprimo de dankemeco postvivus ilin kaj en la daŭro de tri cent jaroj iĝus tago de nacia solenigado. Je la 21a de decembro en la 1620a, post ventega vojaĝo de dek semajnoj, farita en malgranda kaj malbona ŝipeto, venis al la ŝtonplenaj bordoj de Massachusetts'a golfeto, cento de geviroj, tiel nomataj pilgrimoj, kiuj propramove elmigris pro religia kredo kaj serĉis en la nova mondo lokon en kiu ili povas adori Dion laŭ sia propra konscienco. Tiamaniere komenciĝis la loĝigado de Nova Anglujo kaj la fondado de raso de viroj kiu en la jarcentoj sekvantaj pli-malpli konservis la moralan kaj fizikan fortecon de la praavoj, kaj hodiaŭ, en nia kosmopolita lando estas la plej karakteriza amerikana tipo, la vera janko (yankee). Dum la vintro kiu sekvis la alvenon al Plymouth, la pilgrimoj multe suferis kaj multaj el ili mortis, sed kiam venis la milda printempo kaj la varma somero, kun renoviĝo de kuraĝo ili preparis la teron, semis la semojn, kaj al ili aŭtuno donis sufiĉegan rikolton. La unua penso estis esprimo de dankado kaj preĝado. Sekvis jaroj, venis al la nova kolonio aliaj geviroj de la sama forta karaktero, kaj la ĉiujara kutimo de aparta tago por dankado kaj preĝo daŭris, unue laŭ reciproka konsento, poste kiam la kolonio havis difinitan registaron, laŭ oficiala proklamo de la guberniestro. Pasis aliaj jaroj kaj la kolonio pligrandiĝis en la ses Novaj Anglaj ŝtatoj malaperis la antaŭaj malfacilaĵoj kaj malkomfortaĵoj, la popolo prosperis kaj ekkreskis la fruktodonantaj farmoj la urboj kaj urbetoj, sed la antaŭa religia sento ankoraŭ restis kaj de la unua humila kunveno devenis la ĉiujara Nov-Angla festtago. En la daŭro de jaroj kiam komenciĝis la loĝigado de la granda okcidento la junularo de Nova-Anglujo, allogata de aventuremeco kaj per la miloj da okazoj por riĉiĝi sin en la novaj regionoj, elmigris el la oriento kaj portis kun ĝi la solenigadon de sia kara festtago, ĝis fine ĝi estis solenigata tra la tuta lando, kaj nuntempe ĝi estas nacia libertago, apartigata ne sole per la proklamo de la guberniestroj de la diversaj ŝtatoj, sed ankaŭ per proklamo de la Prezidanto. En la fruaj jaroj, ĝi estis festata je diversaj datoj, sed iom post iom, la lasta ĵaŭdo de novembro estas elektita, kaj ĝi nune estas la neŝanĝebla dato. Kiam venis aliaj nacianoj, de aliaj kaj diversaj kredoj, la rigida puritanismo modifiĝis kaj oni komencis kredi ke oni povas estis vera kristano kaj samtempe ĝui senkulpajn amuzojn. Tiam ekaliĝis la karaktero de dankotago de solena religia observo en tiun de duonreligia festtago. Tia estas la nuna dankotago kaj, kiel mi antaŭe diris, ĝi estas la ĉefa familia festo de la jaro, je kiu ĉiu familio tiom kiom eble penas reunuiĝi por granda tagmanĝo. La plej grava manĝaĵo de la tagmanĝo estas rostita meleaĝro. Vere la meleagro estas la nacia birdo kaj malmultaj estas la tabloj sur kiuj ĝi ne aperas je ĉi tiu tago. Laŭ la nacia proklamo la popolo kunvenos matene en la diversaj preĝejoj por diservo de dankado kaj preĝo, la ĥoro kantas ĝojajn kantojn kaj la pastro predikas pri la temo kiu rebruligas la patriotismon de siaj aŭdantoj. Post la tagmanĝo oni sin donas al diversaj amuzoj kaj entute la tago estas tago de ĝojo kaj feliĉo. La malriĉuloj kaj malfeliĉuloj ne estas forgesataj, ĉar la diversaj bonfaradaj organizoj disdonas milojn da tagmanĝoj inter la malriĉuloj, en multaj publikaj ĉambregoj estas kunvenigataj la senhejmuloj, en la lastaj jaroj granda kaj bonega bonfarado estas elfarata de la « sava armeo » kiu en la daŭro de multaj semajnoj estas kolektinta almozon de la plej feliĉaj pro la malfeliĉaj, kaj kiam venas la tago ili disdonas milojn da korboj, plenajn de manĝaĵoj, kaj ankaŭ zorgas pri publikaj kunvenoj de la senhejmuloj. En la hospitaloj oni tiom kiom eble zorgas la suferantojn kaj en la malliberejoj la rigida disciplino estas formetata, al la malliberuloj estas donata bona tagmanĝo kiu estas sekvata de ia amuzo en la preĝejeto. En la urboj la teatroj posttagmeze kaj vespere, kaj en la lastaj jaroj je tiu tago ofte finiĝis la serio de interkolegiaj piedpilkludoj. Se iu el niaj « pilgrimaj patroj » povus reveni teren meze de la tago, eble li bedaŭrus kaj kompatus la malpiecon de siaj posteuloj, sed post ĉio, profunde en la koroj de ĉiuj estas konscie aŭ nekonscie la sama sento de dankemeco por la benoj de la pasinta jaro kiu inspiras la unuan solenigadon : kaj kvankam ĝi estas pli ĝoje esprimata, tamen ĝi devenas de la sama emo kiu en la 1620a plenigis la korojn de la pilgrimoj.

Raportojn de la jus pasinta kongreso kuraĝigas la ĉi tieaj batalantoj pro nia afero kaj interesigas kaj konvinkas antaŭajn skeptikulojn pri la utileco kaj taŭgeco de Esperanto. Vespere je la 4a de novembro, en unu el la ĉambregoj de la Boston'a publika biblioteko, S-ro D-ro Lowell tre interese rakontis siajn spertojn ĉe la kongreso, kaj S-ro Harvey, kiu tiom estas farinta inter niaj blinduloj, ankaŭ parolis pri monato kiun li pasigis en Rusujo, dependante sole de Esperanto kiel rimedo de komunikado. En la oktobra nº de la « North American Review », centjarulo inter niaj literaturaj gazetoj, aperis du artikoloj « The progress of Esperanto » de S-ro Forman kaj « Impressions of the Esperanto Congress » de S-ro De Beaufront. Kvankam ĝi ne estas ilustrita gazeto ĝi enhavas, kiel antaŭbildon, bonegan portreton de D-ro Zamenhof.

Sen ia dubo Usono serioze rigardas Esperanton, kaj ĝia loĝantaro estonte estos trovata inter la pli fervoraj subtenantoj de la universala lingvo.

C. H. FESSENDEN.

Tutmonda Kroniko

16. Eversham (Anglujo). — Edziĝo de princo Don Carlos Bourbons kun princino Luiizino Orleans.

17. Waŝingtono. — Prezidanto Roosevelt per dekreto starigas teritorion Oklahoma al rango de ŝtato.

18. Grenoblo. — Mortas la bulgara eksministro Velitkhov.

Nov-Iorko. — Financa krizo; la fama botanikisto Underwood sin memmortigas.

Stokholmo. — Oni anoncas, ke la jenaj Nobel'aj premioj estos donataj al P-ro Crokes (ĥemio), R. Kipling (literaturo), P-ro Laveran (medicino).

20. Niceo. — Stonfalado enterigas 31 laboristojn.

21. Romo. — La Papo publikigas novan dokumenton kontraŭ la modernistoj.

Milano. — Mortas muzikisto Gaetano Broga.

22. Berlino. — Malfermo de l'Reiĥjstago.

Milano. — Striko de la tramvojistoj.

23. Londono. — La Rusa ambasadoro pagos 40 milionojn da Sm. al la japana ambasadoro por la vivteno de la rusaj militkaptitoj.

24. Parizo. — Sukcesa vojaĝo de l'direktebla aerostato « Patrie ».

Nov-Iorko. — S-ro Rockfeller donacas 5 milionojn da Sm. al la institucio por la medicinaj serĉadoj.

25. Taragono. — Fervoja malfeliĉo; 16 mortintoj.

26. Maroko. — Batalo ĉe la limo inter Maroko ka Alĝerio.

A. TELLINI.

ESPERANTO PRAKTIKA

KORESPONDAĴOJ

Limoges, novembro 1907.

Estimata samideano,

Certe « Parizano », elpensis tre bonajn ideojn, Tamen ŝajnas al mi ke li iom eraris kaj tial, mi sendas al vi tiun leteron.

Unue pri la kartoj de la Liganoj.

Ke la konsuloj zorgu por peti de komercistoj rabaton da 5 %, tre bone, sed ke ili disdonu kaj pagigu la kartojn, tio estus certe bonega rimedo por ricevi iom da aŭ multe da mono, sed mi preferus ke kartoj de grupanoj sufiĉu por ricevi la supre diritan rabaton. Se estus eble aĉeti kartojn en konsulejo, oni tion farus ne estante Esperantisto.

Plie ekzistas Esperantistoj, anoj de Grupoj, kiuj jam pagas jaran kotizajon, ĉu ili devus ankoraŭ pagi la karton de « Parizano »?

Ĉiuj Esperantistoj ne estas riĉaj, ofte, ili estas male, malriĉaj, kaj ekzemple en mia urbo, nia Grupo konsistas nur el laboristaj. Mi povas certigi ke neniu el ili konsentos pagi novan karton dek aŭ eĉ kvin frankojn. Pagi ankoraŭ pagi, ĉiam pagi, jen kia estos baldaŭ deziro de Esperanto. Se oni dirus kiom da societoj oni devas aniĝi, kiom da jurnaloj oni devas aĉeti, kiom da mono oni devos elspezi, oni torpelus, forigus ĉiujn lernantojn. Do, laŭ mi, grupa karto tute sufiĉas. Due pri la konsuloj.

S-ro Parizano diras ke ili reprezentas nur Esperantismon, li estas malprava. Konsuloj reprezentas la Esperantistaron. Nur grupoj reprezentas « ismon » de Esperanto. Tio ne estas sama afero. Tamen mi akceptus kreon de « internacia komitato » per la maniero proponita de « Parizano » kondiĉe ke nacia aŭ internacia komitato ne elektu konsulojn. Nur la Grupoj devas elekti konsulojn kaj nacia komitato devas nur rajtigi la elektojn de l'grupoj.

Plie, mi kredas ke konsuloj ne devas reprezenti ligon de aĉetantoj; ĝi devas reprezenti ĉiuj esperantistojn, aĉetantoj aŭ vendatoj.

Jen, sinjoro Direktoro, la kelkaj rimarkoj kiujn mi deziris fari.

L. LAMANT, konsulo,
Limoges (Francujo).

Bruselo, decembro 1907.

Sinjoro redaktoro,

Permesu al mi danki vin pro via bela kaj saĝa artikolo « Grava momento ». Vi estas tute prava dirante : La necesecon de komuna por ĉiuj netuŝebla fundamento konstante akceptis la Esperantistoj dum la daŭro de dudek jaroj : vi al donas ke, de la Bulonja kongreso tiu Fundamento estis oficiale sankciigita, kaj de tiu epoko, al ĉiuj provoj enkonduki reformojn, oni respondis per tio, ke la Fundamento estas por ni netuŝebla, kaj ne ŝanĝebla; fine vi saĝe diras ke « La ekzisto de tia komuna kaj leĝdona Fundamento estas por ni *absolute necesa* ». Vi tamen tre bone montris ke tiu Fundamento, proponita de la Majstro, kaj sankciigita de la unua kongreso, estas konstitucio ne nur saĝa, sed *liberalega*; nia leĝo fundamenta neniel malhelpas la progresadon eĉ *senliman*. La Majstro mem, « Kabe » kaj aliaj lertaj verkistoj donas al ni ekzemplojn pri la maniero riĉigi nian lingvon, sen tuŝi al la Fundamento. Sed tiu evolucio havas, kaj devas ĉiam havi, du kondiĉojn. 1e La Fundamento mem devos ĉiam resti absolute sama, kaj netuŝebla. 2e La ŝanĝojn per neologismoj devos fariĝi per la Esperantistaro mem. Laŭ viaj belaj paroloj : « neniu homo neniu Komitato, havas la rajton trudi al ĝi perforte sian personan bonplaĉon ». Mi estas certa ke ne ekzistas eĉ unu vera Esperantisto kiu neas tiujn principojn. Sed la kaŭzo de la malpaco kiu ekzistas ĉe du aŭ tri lokoj, estas tute alie. Neniu neis la rajton pliboniĝi nian karan ligvon, saĝe, per natura vojo de neologismo, neniu neis ke estus tre utile por ni akcepti la plenan aprobon de la Delegitaro, sed iaj pseudoreformistoj klopodis anstataŭi Esperanton per nova lingvo subskribita per pseŭdonimo *Ido*. Tiu lingvaĉo, mi ne povos nomi ĝin lingvo, estas mallerta imitaĵo de Esperanto, ĝia ĉefa celo estas elmeti de la ĉefverko de Zamenhof la elementojn germanajn kaj slavajn, kaj anstataŭi la belan skemon de vortoj simplaj per bastardaj franclatinaj abomenoj. Jen la kaŭzo de la *prava* kolero de la du Parizaj revuoj mi ne kuraĝus diri ke tiuj artikoloj enhavis eĉ *unu troan vorton*. Feliĉe, la Esperantistaro monda ĝuas la plej perfektan pacon; mi ricevis leterojn de korespondantoj el dek du diversaj landoj. Ĉie niaj karaj samideanoj restas absolute fidelaj al la Fundamento kaj al sia granda liberecoplena spirito, kaj precipe ĉiuj estas unuiĝe kun la Majstro, kaj al lia Zamenhofa Lingvo. Ne pensu ke Belgujo faras escepton. La Esperantistaro belga estas *absolute fidela al la Majstro*. La opinio preskaŭ unanima en Belgujo kondamnas la reformistan artikolon pri kiu vi parolas ĉe via « Kroniko Esperantista ». Bedaŭrinde ekzistas nur *unu* jurnalo Esperantista ĉe ni, do vi ne devos juĝi la Belgojn esperantistojn fidelajn, laŭ la vortoj de unu jurnalo, ĉe kiu ili *nenion povas fari*. Se ni restos ĉiam fidelaj al nia glora Majstro nia kara lingvo neniel devas timi pri la estonto.

Austin RICHARDSON,
Sekretario de la katolika komitato dum la Tria Kongreso.

Ni lasas al la verkisto de tiu letero plenan respondeblecon pri liaj asertoj kaj speciale pri tio, kio rilatas al la Belga esperantistaro.

(Red.)

DIVERSAĴOJ

Komerco. — S-ro Atanazo jus malfermis en Parizo la unuan « Esperantan Restoracion : A l'Esperanto ». Ciuj samideanoj veturantaj tra Parizo nepre devas iri al la dirita restoracio, kie oni ne nur parolas Esperante, sed ankaŭ manĝas po moderaj prezoj. Jen ankoraŭ imitinda ekzemplo!

***

Pacifismo. — Sekve de la decido de la Munĥena paca Kongreso, Esperanto fariĝis unu el la unuaj priokupoj de la pacifistaj. Ciuj Esperantistoj uzu la okazon por propagandi kaj instrui nian lingvon ĉe la pacifistaj rondoj. Por ĉiuj sciigoj, la pacifistoj, kiuj deziras lerni Esperanton, sin turnu al la *Centra Oficejo*, 51, rue de Clichy, Paris.

***

Esperanto kaj Maristoj. — Oni skribas al ni el Bulonjo : « 1e Por la militŝipo Ibis, kiu vojaĝis ĉe multaj fremdaj landoj, precipe ĉe Anglujo, Boulogne sciigis al grupoj Esperantistaj ĉe havenoj la alvenon de tiu militŝipo kaj la maristoj Esperantistaj estis tre bone akceptataj en Edinburgh. — 2e En Boulogne, venis S-ro .. Bulgaro dezirante enŝipiĝi kiel maŝinisto. Dank'al la klopodoj de la Oficejo Esperantista, tiu samideano estis enŝipigita sur vaporŝipo St-Jean kaj gajnas 250 fr. monate!

KONSULAJ INFORMOJ

Roanne (Francujo). — Konsulo : S-ro Fortier-Beaulieu, 6, rue des Tanneries.

Romo (Italujo). — Esp-Konsulejo, Fotografia Dottarelli, 29 via Belsiana.

Roubaix (Francujo). — Konsulo : A. Denis, 86, rue du Moulin-Roubaix.

Seattle (Wash. Unuiĝitaj Statoj). — Esperanta Konsulejo, S-ro Ch.-E. Randall, zorgas pri ĉiaj aferoj, komercaj, sociaj, k. c. en Seattle kaj la Pacifika marbordo por la Esperantistaro.

St-Etienne (Francujo). — Esperanto-Konsulejo. — Ni sciigis de la baldaŭan fondiĝon de *Industria kaj komerca sekcio* de l'Esperantista Grupo Stefana en la Taverne Ascacienne, 5, place Marengo. Tio estas bonega afero en tiel laborema urbo kiel de St-Etienne kaj ĉirkaŭaĵoj, kies rubandoj, veluroj kaj metalurgiaĵoj estas ĉie konataj. La Grupo elektis kiel konsulton : S-ro E. Gabert, recette municipale.

Valence (Francujo). — Konsulo : J. Delfour-kolegiestro.

Vesoul (Hte-Saône, Francujo). — Konsulo ; S-ro Maurice Girardet, negocisto, 1, rue de la Gare.

Liverpool. — Adreso : The Esperanto School & Ofice, 7, Berry Street, Liverpool.

★ ESPERANTO ★

Avignon (Francujo). — Esperanto-Oficejo. Oni petas germanan servistinon. Skribi germane aŭ esperante kaj senpare al S-ro Albert Santel, terkulturisto, Cours St-Martin, Orange (Vaucluse).

Reims (Francujo). — Esperanto-Ofico, 5, place Royale (telefono 436), Chauvillon, libristo, konsulo. Liveras ĉiujn informojn, parole kaj letere, pri Reims kaj la regiono : turismo, komerco kaj esperantismo. Ricevas ĉiujn leterojn por la grupo esperantista de Reims (S. f. p. E.).

ESPERANTISTAJ HOTELOJ

(2a nomaro)

Aŭstrujo. — Kafejo Union-Ferdinandova, *Praha* P. K. R.

Francujo. — Hôtel de Bretagne, *Nantes*. K.R. — Hôtel du Louvre et de la Paix, *Marseille*. K. R. — Hôtel de Russie et d'Angleterre, boulevard d'Athènes, *Marseille* K. R. — Grand hôtel du Nord, place Puget, *Toulon* (Var). K. R. — Café du Commerce, place du Marché, *Poix* (Somme). P. K. R.

Svisujo. — Hôtel Victoria, *Davos-Platz* (Grisons). P. K. R.

MARISTA ESPERANTISTA LIGO

Oficiala Informilo

1e. — La Marista Esperantista Ligo deziras fari *enketon pri la instruado de la marŝipestroj en ĉiuj nacioj kaj pri la rezultatoj ricevataj de tiu instruado.* Tiu demando estas tute nuntempa kaj utila, ĉar en multaj landoj oni sin okupas pri pliboniĝoj de tiu instruado teoria kaj praktika, precipe en Francujo kaj Rusujo. Tiu tute internacia enketo, ebla nur per Esperanto, tradukata en gravajn naciajn revuojn estus por ni bonega venkarmilo.

Tiuj kiuj povas helpi bonvolu skribi al la provizora sekretario de la Franca Sekcio : S-ro Mesny, en Granville (Manche), Francujo.

2e. — De nun ESPERANTO estas la oficiala organo de la Marista Esperantista Ligo kaj la anoj de tiu Ligo ricevos la jurnalon regule kontraŭ pago da fr. 1,50 (Sm 0,60). Petu la abonojn de S-ro Mesny, en Granville (Manche), Francujo.

Internacia Unuiĝo de la Studentoj (I. U. S.)

Oficiala Informilo

Karaj samideanoj, estimataj kolegoj!

La somero, la sezono de la plezuro kaj amuzado, jam forflugis. Komenciĝas la vintro, tempo de senlaca laboro kaj de energia kreado! Tiam ankaŭ ni studentoj ne devas senokupe ripozi. La bonajn fruktojn kiujn nia I. U. S. povis rikolti dum la pasinta duonjaro, ni devas elsemi por ke ili en la venonta jaro kresku kaj portu multfoje pli grandan nombron da floroj. Briletas ja en la malproksimeco bela celo : La Kvara Kongreso, je kiu ni espereble havos nian oficialan kunvenon por kune konsiliĝi pri la plua perfektigado kaj disvastigado de vnia unuiĝo kaj por persone konatiĝi kaj interamuzi post la laboro. Do, fervore propagandu dum la vintro, varbu multe da novaj anoj, por ke ni tiam povu doni kalkulraporton pri nia debito kaj kredito!

La Prezidanto :
S. WICHERT, Altonaerstr, 18,
Berlin. N. W. (Germanujo)

Proponojn pri plej efika propagando oni sendu al S-ro sekretario de la I U. S. A. Vincenneux collège de Beaune (Côte-d'Or), Francujo.

Bedaŭrindege unu el niaj kamaradoj jam mortis : S-ro Stud. Silva, el Portugalujo. Trankvilon ni deziru al liaj cindroj kaj bonan memoron ni konservu al li!

***

Novaj aliĝoj

53. Léon Bassée, 12, rue Gambetta, *Douai* (Francujo). — 54. Gaston Barral, 112, rue Gambetta, *Lille* (Francujo). — 55. A. Patterson, Queen's College, *Oxford* (Anglujo). — 56. Walter Western, Agnes Street, 42, *Glaskow* (Skotlando). — 57. B. A. M. Kearney, Mysore Road, 15, Lanvendell Hill, *London S. W.* (Anglujo). — 58. Carl Zacherl, Eggendobel, 14, *Passau* (Germanujo) — 59. Gustav. Rauch, ingeniers, Weidenalle, 14, *Hamburg* (Germanujo). — 60. Edmond Bouvier, rue des Maraichers, 55, *Genève* (Svisujo).

AL NIAJ LEGANTOJ

Pro la festoj de Kristnasko kaj de Nov-Jaro, nia venonta nº aperos nur la 30an de decembro kun SES PAĜOJ. La proksima nº aperos antaŭ la 20a de januaro. Poste, « Esperanto » elirados kiel ordinare espereble, kun kelkaj ŝanĝoj satotaj de ĝia legantaro.

***

Pro troeco de materialo, ni estas devigataj prokrasti la rezultatojn de nia *Enketo pri la kosto de la Vivado* ĝis venonta nº.

Direkcio.

ANONCETOJ

Kosto. 8 spesdekoj (20 centimoj, 2 pencoj, 10 pfenigoj) por ĉiu linio.

Rabato de 25 % por 6 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtos enpresigi 3 liniojn unufoje senpage.

Oni sendu al ni la anoncetojn antaŭ la 5 kaj 20 de ĉiu monato, aldonante la monon. Poŝtmarkoj estas akceptataj. Oni skribu plej legeble.

Goole (Yorkshire-Anglujo). — S-ro Mollay, Custon House, deziras interŝanĝi poŝtajn kaj fiskalajn markojn; nepre respondos.

London (Anglujo). — H. T. Bailey, 31, Caversham Road, Kentish Town, deziras aĉeti : *La Esperantisto*, 1889 ĝis 1895, jarkolektojn aŭ eĉ apartajn numerojn. Ankaŭ *Lingvo Internacia*, jarkolektojn nebinditajn, 1897, 1899. Ankaŭ deziras ricevi po unu ekzemplero de sekvantaj : *Espérantiste Canadien*, *La Stenografiisto*, *L'Esperanto*, (Nurnberg, 1889), *Mondlingvisto*, *Munĥena Esperantisto*. Ĉiu Grupo kiu eldonos novan gazeton estas petata sendi sciigon. *NE* deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilus.

Voiron (Isère-Francujo). — F-ino Jullien multe deziras interŝanĝi vidajkartojn koloritajn.

Teyá (Barcelona-Hispanujo). — S-ro Barrera, farmaciisto, deziras korespondi kun samideanoj ŝatantaj ĉiuspecajn Kagenmetitajn birdetojn, speciale neeŭropajn, pri iliaj movoj kaj nutrado.

Rotterdamo (Holando). — S-ro G. Allard, direktoro de Granda Hotelo Coomano, Hoofsteeg 12/22, deziras korespondi kun alilandanoj.

Douai (Francujo). — S-ro Henri Coppin, 3, rue François-Cuvelle, deziras korespondadiper ilustritaj poŝtkartoj kun esperantistoj el ĉiuj landoj.

Beaune (Côte d'Or-Frankujo). — Sendu 80 Spesdekojn al S-ro J. Pion, Société Générale, kaj vi ricevos *belan kolekton da 13 ilustritaj poŝtkartoj esperantistaj de Beaune*; tiu karto estos afrankata sur la flanko vidaja.

Amsterdam (Holando). = S-ro S. de Vries, Zauriergracht, 108, fiziognomiisto, redaktoro de la rubriko *Grafologio* de la plej eminentaj holandaj gazetoj, priĵuĝas la *karakteron laŭ portreto kaj manskribo*. Simplaj priĵuĝoj 3 fr. (1.20 sm); detalaj *priĵuĝoj 6 fr.* (2.40 sm)

St-Polten (Aŭstrujo). — S-ro Karlo Fuchs, 38 Wienerstrasse, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj per memfaritaj fotografaĵoj prezentante personojn kaj belajn pejzaĝojn.

Esperanto-Eldonejo. — Karl Jost, Fröhlichstr, 40, *Zürich V-(Svisujo)*. Al ĉiuj geesperantistoj, estas rekomendataj la jenaj broŝuroj :

Esperantista Kantaro. 13 kantoj originalaj aŭ esperantigitaj por 4 voĉoj miksitaj, kolektitaj de Karl Jost. Prezo : 1 fr. (40 Sd).

Memorajo de la dua Universala Kongreso de de Esperanto, de K. Jost (unua broŝuro antialkohola). 20 cent. (8 Sd).

Lehrbruch der Esperanto Sprache, de A. Nötzli. fr. 1 (40 Sd).

La Kaprino de S-ro Seguin, tradukis A. Yersin. 15 cent (6 Sd).

Propagandaj poŝtkartoj, 100 ekzempl. po fr. 1,50 (60 Sd).

Postulu la suprajn verkojn de via libristo aŭ rekte de la eldonisto. Al societoj esperantistaj, favoraj prezoj.

Sorèze (Tarn. Francujo). — S-ro Cau, kolombofilo, vendas *vojaĝkolombojn*, raso Verviers. koio de nesto : 2 fr. 50 (1 sm) po paro. Maljuna, gekolomboj : 6 fr. (2.40 sm.) po paro; aŭ interŝanĝas por fotografilo aŭ pligrandiga fotografilo.

Aubry (Nord-Francujo). — S-ro E. Philippe. El kiu nefranco mi ricevos 50-200 uzitajn miksitajn *poŝtmarkojn* sialandajn aŭ nefrancajn, mi tuj resendos al ĝi saman kvanton da francaj aŭ nesialandaj. Ankaŭ interŝanĝos 20-50 malsamajn samkondiĉe.

Bukaresto (Rumanujo). — D-ro Kimel sciigas siajn korespondantojn, ke pro tempomanko li ne povas plu daŭrigi la korespondadon.

Caterham Valley (Surrey-Anglujo). — F-ino Willmore. « The Hydro », deziras korespondi per bildpoŝtkartoj kun alilandaj gejunuloj.

Montouzin (Aube-Francujo). — S-ro J. Guillaume, interŝanĝas poŝtkartojn. Nepre respondos.

Troyes (Aube-Francujo). — S-ro G. Jung, 14, rue de la Guérarde, interŝanĝas poŝtkartojn; nepre respondos.

Le Locle (Svisujo). — S-ro Th. Roniger, komizo deziras korespondadi poŝtkarte aŭ letere kun ĉiulandaj geesperantistoj el ĉiuj partoj de l'mondo

Assencières (Aube-Francujo). — S-ro L. Gallois interŝanĝas poskartojn. Nepre respondos.

München (Germanujo). — S-ro Morgenroth, Telegramt, interŝanĝus ĉiuepokajn Bavarajn poŝtmarkojn kontraŭ diversaj de aliaj landoj laŭ sama nombro.

London (Angluio). — S-ro C.-A.-S. Browne, reklamisto, 53 et 54 Wych Street, London W. C., kontentigos korespondi kun Esperantistoj koncernante anoncadon en britaj, koloniaj kaj fremdaj jurnaloj.

Praha (Bohemujo). — S-ro J. U. D-ro Bičište, ricevinte doktoran diplomon en Bohema universitato, petas ĉiujn gratulintojn ricevi sian sinceran dankon.

London (Anglujo). — S-ro James Weir, 17, Rossetti Buildings, Westminster, S. W., alilanda korespondanto de la « City of Westminster Lodge I. O. G. T. » deziras ricevi periode sciigojn pri la abstinenca movado en ĉiuj landoj. Ciaj informoj estos danke ricevataj.

London (Anglujo). — S-ino P. Lewis, 11, Grosvenor Road, Chiswick, deziras interŝanĝi ilus. poŝtkartojn; ĉiam respondos.

Sabadell (Barcelona-Hispanujo). — S-ro J. Ferrer, muzikisto, Strato Paces, 61, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun fremduloj.

Roskild (Danujo). — S-ro William Raith, Strato Hans Kospitaj, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kun alilandaj geesperantistoj.

Bilbao (Hispanujo). — S-ro F. Sarzosa, strato Elcano, 3, 1e. deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn; ĉiam respondos.

Chaux-de-Fonds (Svisujo). — Propagandaj *arte-ilustritaj* poŝtkartoj, po malkara prezo estas aĉeteblaj ĉe S-ino Houriet, la Chaux-de-Fonds.

Sabadell (Barcelona-Hispanujo). — S-ro P. Pascual advokato, via Massagué, 45, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun fremduloj.

Barcelona (Hispanujo). — S-ino Franciskino Igual, Calle Universidad, nº 54, drogueria. Mi deziras korespondi per ilustrataj poŝtkartoj kun fremdaj Esperantistoj.

Voronoge (Rusujo). — S-ro A.-Constantin Gregoire Wesselovsky, domo 20, strato Vyahereff. *Por l'atento de la esperantistiĝontaj vegetaranoj* : ia vegetarana familio, volanta perfektiĝi pri Esperanto per interŝanĝado de ideoj, proponas al simila sama fremlanda familio korespondadi, kaj reciproke sanĝi ilustritajn poŝtkartojn; korespondado inter infanoj de tiu ĉi familio estas aparte ŝatata.

Mourmelon-le-Grand (Marne-Francujo). — S-ro Merile Egret, 21, rue du Génie, donas al ĉiu komercisto informojn pri la regiono; aldonu poŝtmarkon per la respondo

Odensee (Danujo). — S-ro Valdemar Johansen, 1 Roarsvej, deziras korespondi por interŝango de ilustritaj poŝtkartoj; *ĉiam tuj respondos!*

Bellegarde (Ain-Francujo). — S-ro Richard, Internaciaj transportoj. — Esperantista konsulo, donos ĉiujn informojn al la Esperantistoj.

St-Denis (Seine-Francujo). — S-ro Gustave Tabresse, Maison Damoy, deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj kun fremlanduloj; ĉiam tuj respondos.

Goole (Yorkshire-Anglujo). — S-ro J. D. Rodgers, 60 Wetherill Street, tre deziras interŝanĝi koloritajn poŝtkartojn kun fremdaj samlingvanoj speciale kun Britaj kolonianoj.

Pskov (Zaveliĉje-Rusujo). — S-ro V. Jackontov, deziras korespondi kun esperantistoj el ĉiuj landoj.

Chalon-sur-Marne (Francujo). — Doktoro Jenny, 41, Faubourg Saint-Antoine, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj nefrancaj.

Monata kroniko

Novembro 1907.

La ĉefa fakto de la internacia politiko estis liverita de la vizito de la imperiestro de Germanujo al reĝo Edvardo VIIa. Tiu vizito, jam de longe antaŭkalkulita kaj ĉiam prokrastita pro diversaj maloportunaĵoj, estis interpretita kiel simptomo de paco kaj interkonsentemeco inter ambaŭ popoloj, kies ĝisnunan neamikecon kaŭzis ĉefe komerca industria konkurenco. En la sama komerca celo, pro kiu ili antaŭe interbatalis, la negocistoj de ambaŭ nacioj klopodis por efikigi la jusan reamikiĝon, kiu estas — almenaŭ oni tion certigas — rezultato de la lerta pacema politiko de Edvardo VIIa.

Rusujo, aŭ pli guste tre malgranda parto de Rusoj, jus elektis trian Dumon, kiu, malsame ol la antaŭaj, havas grandan plimulton konservativan. La Rusa popolo tute ne interesiĝis pri la baloto de tiu tria deputataro kaj havas al ĝi nenian konfidon, pro tio ke ĝi estos klasa parlamento sen iniciativemeco kaj sen programo. Tamen, povas esti, ke tiu tria Dumo, pro sia konservativemeco mem, pli longe vivos ol la du antaŭaj kaj sukcesos ekkrei parlamantan kutimon kaj tradicion, kiuj ĝis nun tute mankis al Rusujo.

En Francujo la Parlamento rekomencis kunveni, meze de neordinara trankvileco; nur la demando pri la salajro de la deputatoj kaj restaĵoj el la antaŭaj disputoj pri eklezio kaj ŝtato elvokis kelkajn disputojn, sen kiuj sinjoroj parlamentanoj ne povus vivi kaj meriti sian salajron, sed, en ĝenerala maniero, la situacio de la ministraro Clémenceau estas tre fortika kaj oni antaŭvidas por ĝi ankoraŭ longan, almenaŭ parlamente longan, vivon.

La Itala senato nun juĝas aŭ provas juĝi la proceson kontraŭ eksministro Nasi, sed ĝi estas senĉese haltigata en tasko per sennombraj malhelpoj, kies kaŭzo venas ĉefe de tio, ke malordo kaj bedaŭrindaj moroj ekzistas en la Itala administrantaro. En Sicilio, okazas fervoraj manifestoj por Nasi, kiu verŝajne baldaŭ triumfe reiros duonabsolvita al siaj fidelaj samurbanoj.

En Portugalujo, la kvazaŭabsolutismo de l'ĉefministro Franco subtenata de la reĝo daŭras elvoki kreskantan opozicion, sad tiu opozicio mem estas disdividata en diversaj sin reciproke kontraŭbatalantaj partioj, tiel ke ilia agado estas multe pli malgranda ol ĝi povus esti se regus unueco; tamen, ŝajnas, laŭ la plej lastaj novajoj, ke la movado kontraŭ la nuna registaro pligrandiĝas.

La malgranda princlando Montenegro, al kiu ĝia estro antaŭ kelka tempo donacis konstitucion, estis longe agitata post tiu okazintaĵo kaj eĉ estis malkovrita komploto kontraŭ la princo, kiu transdonis tro ligimitan kompetentecon al la nacia deputataro. Nuntempe la situacio estas pli bona, kaj trankvileco denove regas en tiu interesa lando de Balkanujo.

Se de tiu loko ni transaltas super la Oceano kaj albordiĝas ĉe la tero de Unuiĝitaj Statoj, ni tie trovos gravajn financajn katastrofojn kaj bankajn bankrotojn, kiuj kaŭzis gravajn konfuzojn en la lando kaj havos nerektan influon en la tuta Eŭropa financistaro. Fine, ni ne forgesu, ke la Maroka ĥaosajo, pri kiu oni jam silentis, denove estis kampo de batalo ĉu inter Marokanoj, ĉu inter Francoj kaj Marokanoj. La nova pretendanto al la sultaneco ricevis malvenkon, sed oni scias, ke en Maroko la malvenko estas ofte pli profitodona ol la venko mem...

Tiel alproksimiĝas la fino de la jaro 1907a.

A. R.

KRISTNASKAJ KAJ NOVJARAJ KARTOJ

PRESITAJ ESPERANTE — ESPERANTISTOJ, MENDU TUJ.

POSTULU SPECIMENOJN AL

W. SPEAIGHT & SONS Esperantistoj Presistoj

98 et 99, Fetter, London, E. C. (Anglujo)

Liverantoj de Mustardo — kaj Amelo al la Reĝo

Laŭ privilegio

J. & J. COLMAN

(Akcia Societo)

MANUFAKTURISTOJ DE

MUSTARDO, AMELO, BLUIGAĴO

KAJ

BRITA RIZFARUNO

108, CANNON STREET, LONDON
kaj CARROW WORKS, NORWICH (Anglolando)

VIVO DE JESUO

de *Ernest Renan*

laŭ la 78a milo franca tradukis

Emilo Gasse

en Francujo fr. 2,75; alilande sm. 1,15 (fr. 2.90). mendebla ĉe ĉiu librov'isto.

Emilo GASSE, 77, rue Ernest Renan, Havre (Francujo), kaj ĉe liaj korespondantoj :
Anglujo : Brita Esperantista Asocio : 13, Arundel st. Strand, London W. C.
Germanujo : Esperanto Verlag Möller et Borel, Berlin S 42.
Rusujo : Sto Espero, B. Podjaĉevskaja 24, kv. 12, St-Petersburgo.
Svedujo : Esperantisten, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.
Svisujo : Karl Jost, 40. Frölichstr, Zürich.

Restoracio "A l'Esperanto,,

80, RUE MAZARINE — PARIS 6e

Oni parolas en Esperanto. La geesperantistoj trapasantaj Parizon povas de nun manĝi en *esperanta restoracio*, kie ili trovos afablan bonvenon kaj bonegajn manĝaĵojn je *moderaj prezoj.*